


Eŭropa Bulteno

Oktobero 2011, Numero 109

NOVAĴOJ PRI EŬROPA ESPERANTO-KONGRESO DE EEU EN GALIVO 2012



1. Ministrino pri EU-aferoj malfermos la galivan kongreson.

Irlanda ministrino pri EU-aferoj, Lucinda Creighton konfirmis ke ŝi tre volonte malfermos nian galivan EEU-Kongreson.

2. Nekredeble bona reklamado por nia galiva kongreso estas efektivigata en la plej popularaj gazetoj de la urbo. Dum septembro kaj oktobro aperis deko da anglalingvaj artikoloj kaj intervjuoj pri tiu temo.



3. La novan prezidenton de Irlando, Michael D.

Higgins jam vendredon kiam klaris ke nur li povos gajni, mi invitis esti alta protektanto. Mi konas lin persone, ĉar ni pasigis semajnon kune en Moskvo en 2001. La 11-an de novembro li oficiale iĝos prezidento por la oficperiodo de 7 jaroj.

Informoj pri la kongreso troveblas en la kongresa paĝaro ĉe www.eeu-kongreso.webnode.com

Seán Ó Riain

NIAJ LANDAJ MOVADOJ RUMANIA ESPERANTO-MOVADO

En Rumanio nur la 20-an de oktobro 1904 Henrich Fischer, industriisto en Galati, malfermis la unuan kurson de Esperanto kun 25 lernantoj.

D-ro Gabriel Robin, konata kemiisto, komencis viglan propagandon kaj esprimis la ideon komenci kun la blinduloj de l'blindulejo „Vatra Luminoasă Regina Elisaveta” (Luma Hejmo Reĝino Elisabeta) tion kio estos ebla kun la permeso de Ŝia Moŝto la Reĝino Elizabeto, fondintino de tiu ĉi institucio. La 23-an de septembro 1907, laŭ iniciato de D-ro Robin, fondiĝis la „Rumana Esperantista Societo”. Tiam komenciĝis brila periodo de Esperanto en la lando. En 1909 povis okazi la unua rumanlanda E-Kongreso en Bukureŝto. UŜE-EŬO(1930-1938) estis organo de UŜE (Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo), kiu aperis en Timisoara. La ĉefcelo de la UŜE-programo estis unuigi, kiel eble plej multe da ekonomiteritorioj kaj ĉi tiujn gvidi unuece, politike kiel doganunion. Esperanto devintus esti la oficiala lingvo, ĉar Esperanto estas neŭtrala kaj la plej facile lernebla lingvo. Ĝi estis la unua iniciato por fondo de Eŭropa Unio. En 1946 RES estis unuafoje jure rekonita, la gazetaro montris grandan simpatian al Esperanto.

Universitata profesoro I.F.Bociort sukcesis fondi en 1978 la „Kolektivon pri Esperanto kaj Interlingvistiko” ĉe la Rumana Akademio pri Sociaj kaj Politikaj Sciencoj ankaŭ per la helpo de estinta prezidanto de UEA, Humphrey Tonkin, kiu vizitis en Bukureŝto prezidanton de la Rumana Akademio pri Sociaj kaj Politikaj Sciencoj en la somero 1978. La agado de la kolektivo celis la sciencan kaj universitatnivelan instruadon de Esperanto. En pluraj filologiaj fakultatoj de rumanaj universitatoj Esperanto komencis esti instruata kiel nedeviga studobjekto, kaj krom lernolibroj kaj vortaroj aperis ankaŭ lingvistikaj studoj pri Esperanto. En 1985 venis malpermeso pri ĉiu ajn esperantista agado. Prof. Bociort estis eksigita el la universitato de Timisoara, sed la E-agado daŭris kaŝe, en la loĝejoj de esperantistoj.



Komence de 1990, en januaro, renaskiĝis la Rumana Esperanto-Asocio (REA). Prezidanto elektiĝis prof. I.F.Bociort. Vicprezidantoj estis d-roj Aurel Boia kaj Constantin Dominte; sekretario de REA estis d-ro Marian Constantinescu. REA havis en Rumanio ĉirkaŭ 40 filiojn. Krome fondiĝis Rumana Universitata Esperanto-Centro kun sidejo en Timiŝoara. La estro de tiu centro estis ankaŭ prof. Bociort; vicestroj estis prof.

d-ro Hans Bettisch kaj doc. Minerva Bocsa. La nombro de esperantistoj en Rumanio estis malfacile taksebla. La asocio disponis pri pli ol 3000 nomoj. La plej multaj lernis la lingvon dum la 1970-aj kaj 1980-aj jaroj en universitataj kursoj, kiuj multis tra la lando. Inter 13-15-a de julio 1990 okazis en Timisoara la unua rumana esperantista kongreso post la dua mondmilito.

La 25-an de aprilo 1990, en la urbo Tulcea, estiĝis „*Unuiĝo de Esperantistoj Ŝakludantoj en Rumanio*“ (*UŜER*). Fine de 1990 oficialiĝis kun jura personeco „*Asocio de Esperantistoj Kluĵo*“ (*AEK*).



Inter 7.-12-a de aprilo 1991 okazis en Odorheiul Secuiesc la 9-a Internacia Metodika Seminario, organizita de ILEI. La junulara sekcio de Rumana Esperanto-Asocio restariĝis en marto 1991 sub la nomo REJO, kaj pli malfrue, je la 20-a de novembro 1995, estiĝis en Timișoara *Rumana Esperantista Junulara Asocio (RumEJA)*. Je la 14-a de septembro 1991 en Brașovo fondiĝis „*Rumana Esperanto Fervojista Asocio*» (*REFA*) kaj en urbo Oradea la sekcion de IKUE. 23 septembro 1992 estas la dato kiam aperis nova jura persono „*Asocio Esperanto Oradea*“ (*AEO*). En aŭgusto 1993, en Sibiu, la rumana filio de AIS fondita en 1990 estis reorganizita sub la nomo „*Asocio Internacia de la Sciencoj-Rumanio*“, kiu estis legaligita kaj poste aliĝis al AIS-San Marino. En Rumanio malregule aperis bulteno de la nacia E-organizo (Esperanto-Infomilo - 1992; ES-TO - 1998); kaj ankaŭ aliaj kiel Donaris (1990)-Tulcea; Bukureŝta Infomilo kaj Medicina

Infomilo(1994)-Bukureŝto, kaj Bazaro en Kluĵo. *Eldonejo Bero* en Usono, aperigis diversajn tradukaĵojn el la rumana literaturo. Aperis ankaŭ en Rumanio la dulingva „*Eminescu en Esperanto*“. La eldonon prizorgis la senlaca Aurora Bute kaj redaktis la kompetenta Constantin Dominte. Dum la jubilea jaro de Eminescu aperis, ekster Rumanio alia dulingva volumo, kun la plej longa poemo de Eminescu „*Luceafărul*“, kies E-lingva versio, titolita „*La Vesperstel*“, ŝuldiĝas al bukureŝta tradukisto Jozefo E. Nagy. Alia E-versio de „*Luceafărul*“, malpli konata, aperis same en Usono, en 1998 ĉe California Publishing Company (San Francisco) sub la titolo „*Lucifero*“ (tradukinto: Jozefo Petrin).

Inter la 14-a kaj la 19-a de julio 2003 okazis la 14-a Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco en la nordorient-rumana urbo Oradea, kaj inter la 7-a kaj la 14-a de majo 2005 okazis en Brașovo la 57-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, kiu la unuan fojon okazis en Rumanio.

Inter la jaroj 1994-2007, Mihai Trifoi – instruisto en Bixad, distrikto Covasna (Kovasna) agadis fervore diversflanke. Li fondis Lernejan Esperanto-Klubon, verkis e-instrulibrojn, tradukis librojn, estis intervjuita de tv- kaj radioĵurnalistoj, instruis esperanton al klasoj de gelernantoj, partoprenis en diversaj projektoj, pretigis teamojn de infanoj, kiujn akompanis al Universalaj Kongresoj, respektive Internaciaj Infanaj Kongresetoj (en Prago, Montpeliero, Berlino, Tel-Avivo, Zagrebo, aŭ al aliaj e-renkontigxoj (en Chester / Britio, Kastelo Grezijono / Francio ktp). Post ĉiu vojaĝo li verkis kaj publikigis longajn artikolojn, precipe en la distrikta ĵurnalo *Cuvântul nou* (La nova vorto) kaj en diversaj e-ĵurnaloj aŭ gazetoj.

Okaze de la UNESKO-jubileo, 150 jaroj de la naskiĝo de L. L. Zamenhof (1859-1917), en la urbo Slatina, ĉefurbo de la distrikto Olt, en la suda parto de Rumanio, la tiea distrikta muzeo malfermis la ekspozicion kun bildoj kaj dokumentoj titolitan, *Momente el la historio de la esperantista movado en Rumanio, 1889-2009*. Pri tiu evento informis diversaj gazetoj kaj

televideo : Vidu : Google Videos-Expozicie esperantistă 2608-serĉo videos ; www.adevarul.ro/articole/slatina-oltenii-pot-invata-limba-esperanto/ kaj www.cimec.wordpress.com/2009/08/25/slatina-expozitia-foto-documentara-momente-din-istoria-miscarii-esperantiste-n-romnia-1889-2009/ ; Ankaŭ en la urbo Pitești, la distrikta biblioteko malfermis la ekspozicion „150 jaroj de la naskiĝo de L.L.Zamenhof (1859-1917), inventinto de la lingvo internacia Esperanto”, Pri tiu evento oni skribis en la gazetoj www.curier.ro/index.php?option=com_content&task=view&id=10352&Itemid=377 kaj www.presaonline.com/stiri-locale/inventatorul-limbii-esperanto-sarbatorit-la-biblioteca-82137.html).

Asocio Esperanto-Oradea festis je la 7-an de majo 2010, Centjariĝon de E-agado en la urbo Oradea. Vd. <http://bibliotecibihorene.blogspot.com/2010/05/azi-7-mai-2010biblioteca-judetana.html> kaj <http://www.ipernity.com/doc/143032/.../190907> .

Bonan organizitan agadon oni observas en Brașovo, kie agas Rodica Todor, prezidanto de I.F.E.F kaj eksprezidanto de Rumana Esperantista Fervoĵista Asocio. Ŝi organizis 83-an Kongreson de S.A.T. en jaro 2010. Vd: http://observator.a1.ro/social/Congres-de-esperando_16428.html ; Krome ŝi instruas Esperanton al la lokaj klubanoj kaj multe helpas en la organizado de diversaj E-aranĝoj, estante unu el la plej fervoraj esperantistinoj de Rumanio.

Sed nia baza aganto restas s-ino Aurora Bute, EAR-estraranino, multjara prezidanto de EAR, kiu agadas en la urbo Timisoara kaj havas ege riĉan aktivecon kun bonegaj rezultoj. Senlace ŝi strebas daŭre antaŭen puŝi la E-movadon en Rumanio.

Lastaj informoj aperintaj en rumana gazetaro: „*Esperanto-utopie sau realitate I?* – (Esperanto-utopio aŭ realeco)? aperis en ĵurnalo „*Mesagerul de Covasna*” el 12.09.2011, vd. <http://www.mesageruldecovasna/stiri/esperanto-%E2%80%93-utopie-sau-realitate-i/> kaj *Esperanto-utopio sau realitate II?*, vd. <http://www.mesageruldecovasna.ro/educatie-cultura/esperanto-%E2%80%93-utopie-sau-realitate-ii/> aperinta en la sama ĵurnalo en 13.09.2011. Ambaŭ artikoloj estis skribitaj de Mihai Trifoi, nuna prezidanto de Esperanto-Asocio de Rumanio, kiu argumentas favore al instruado de Esperanto.

Nun en Rumanio agadas Esperanto-Asocio de Rumanio (ĉirkaŭ 130 anoj), Rumana Esperantista Fervoĵista Asocio (ĉirkaŭ 300 anoj), Asocio-Esperanto Oradea (kun 30 anoj), Asocio-Esperanto Cluj-Napoca (kun 23 anoj). Ankaŭ funkcias ILEI, AIS, IKUE kaj KELI-sekcioj. Ne ekzistas entreprenoj aŭ institucioj, kiuj havas kiel agadon e-produktojn. Pliajn informojn pri la Rumania Esperanto-Movado vi trovos ĉe <http://www.ipernity.com/home/m.vochin>

Marian VOCHIN, Rumanio

Rimarko de la redaktoro: Ekde 1968 kiam jam en la Unua Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) en Zagrebo partoprenis pupteatro el Cluj kun spektaklo en Esperanto kun kelkaj aktorinoj kiuj bone parolis E-on (ĉefe Julia Sigmond) en postaj sepdekaj kaj okdekaj jaroj partoprenis en PIF pluraj rumanaj pupteatroj kun spektakloj en Esperanto. (detale pri tio en la libro »Pupoj vive« pri 40 jaroj de PIF aperinta en Zagrebo en 2009). La ĉefaj morotoj de tiu agado estis Jozefo Petrin kaj Julia Sigmond.

PACMARŜO EN ITALIO: Pli bone la afero ne povus funkcii!

"Pli bone la afero ne povu funkcii: bela tago, bona teamo de amikoj helpantaj, amasego da homoj, kiuj daŭre alvenadis, praktike granda serpento da marŝantoj, kiu komenciĝis je la 11-a kaj daŭris ĝis la 18-a.horo" Tiel komentis Gianni Conti, la organizinto de la informado pri Esperanto de Itala Esperanto-Federacio dum la pac-marŝo.



Pro la ekzisto de balustradoj en la punkto de la vojo, kie nia grupo estis, la grupo ligis la stangojn de la grandegaj literoj ESPERANTO al la balustradoj. Niaj homoj, do, estis liberaj disdonadi la informan materialon portitan el Milano. Temis ĉefe pri 5000 kunfalditaj informfolioj kaj kiam ili elĉerpiĝis oni disdonis ĉirkaŭ 1000 informilojn, kiujn kunportis la esperantistoj el Ankono.

Multaj esperantistoj (proksimume 30) ĉeestis kaj kunhelpis, tiel ke ni menciis nur la nomon de la prezidanto de IEF: Aldo Grassini. La sperto estis

tre entuziasmiga, ĉar temas pri publiko ĉiam al Esperanto kaj al multaj aliaj utopiaĵoj. Venontan jaron ni estos ankaŭ tie kun ankoraŭ pli da informfolioj.

Renato Corsetti

La Marŝo de la Paco "Peruĝo-Asizo" celebris tiun ĉi jaron sian 50-an jubileon.

Dum la pasintaj jaroj esperantistoj ĉiam partoprenadis en tiu ĉi marŝo aliĝante al la defilado kun siaj propraj reklamafiŝoj. Tiu ĉi nia partopreno estis certe meritoplena afero, tamen neniam ni sukcesis esti plene videblaj. Kelkaj samideanoj invitis min akcepti la taskon organizi la partoprenon alimaniere por vidigi al la publikego niajn panelojn kun la skribaĵo ESPERANTO. Mi komencis prepari 5000 paperrulojn kiuj enhavis tri belegajn reklamfoliojn. Poste ni aĉetis 25 trikotaĵojn kun la skribaĵo "Esperanto la lingvo de la paco" kaj 25 ĉapeletojn kun la desegnaĵo de la mondo en ovalo kaj la vorto Esperanto en ties centro. Ni metis du seriojn da paneloj (kiel tiuj kiujn ni uzadas sur placo Sankta Petro) je la flanko de iu ronda trafikinsulo en la antaŭurbo de Asizo kaj ni atendis la alvenon de la karovano. Ni estis vidalvide al amaso da partoprenantoj (oni parolas pri proksimume 200.000), tiel ke post unu horo kaj duono niaj 5000 paperruloj elĉerpiĝis. Pro tio ni ekfunkciigis nian megafonon kaj per tiu ni faris martelantan propagandon dum pli ol kvar horoj. Ni estis tre kontentaj konstati ke la partoprenantoj treege interesiĝis pri Esperanto, kaj tio estis antaŭvidebla, ĉar ni ja iris semi sur tre fruktora grundo!

La rezultoj vidiĝis preskaŭ tuj poste, fakte dum la sekvantaj tagoj ni trovis plurajn aliĝojn al niaj enretaj kursoj. Estis vere sensacia sukceso!

Gianni Conti

INTERVJUO DE EŬROPA BULTENO KUN TEATRO UMS 'n JIP EL SVISLANDO

1. *Kiom da spektakloj vi ĝis nun havis pri via Opero dediĉita al Esperanto?*

La opero THREE von UMS 'n JIP estas ĝis nun ludita 22-foje, 12-foje en Svisio (Basel, Zürich, Brig, Visp, Sierre) kaj 10-foje en Francio (Festival d'Avignon, Palais Royal).

2. *Kia estis la reago de la publiko?*

Reagoj de la publiko al la opero estis tre surprizaj:

a) Neesperantistoj estis eksterordinare tuŝitaj de la problemo prezentita kaj ofte post la spektaklo diskutis dum horoj tre engaĝite pri tutgloba kaj eŭropa komunikadproblemo kaj lingvaj temoj. La metaforoj aplikitaj en la muzikalo vere efikis kaj estis provokaj.

b) Esperantistoj estis tendence konfuzitaj – ili atendis senduban poresperantan pledon, dum la teatraĵo - malgraŭ la enhance klara poresperanta kaj poreŭropea pozicio – ofte atentigas pri malfacilaĵoj, malesperoj kaj kontraŭdiroj rilate realigon de iu eŭropa Lingua Franca.

Entute: ĝi estis por ĉiuj neforgesebla, riĉluda, koloroza kaj metaforriĉa travivaĵo kiu instigas al pripenso, duboj kaj espereble al agado.

3. *Kia estis ĝenerala opinio de la kritiko pri la opero mem (artvaloro) kaj pri la temo (Esperanto)?*


La kritikoj valorigis unuanime bonegajn komponistajn kaj interpretajn kvalitojn de la ensemblo UMS 'n JIP, kaj ties fajnsentan kaj fajnnervan prilaboron de la rimedoj je dispono, voĉojn kaj elektronikon, fortan vid- kaj scenlingvon de Wolfgang Beuschels (reĝisorado) kaj Simon Wunderlichs (scenejaranĝo). La temo Esperanto estis unue prenita per fortega miro kaj poste serioze eldiferenciĝita kaj fine entuziasme aprokata.

4. *Ĉu via grupo estas kontenta rilate la ĝisnunajn rezultojn?*

UMS 'n JIP estas pro la ĝisnunaj rezultoj tre kontenta. Pro tio ni planas kiel daŭrigon fari la operon tute en Esperanto kaj ĝin internacie prezenti. Kaj tio estos grave helpata pro la fakto ke UMS 'n JIP ricevis stipendion por la jaroj 2011-13 MusiquePRO de la kantono Wallis por eksterlandaj turneoj. Tio devus konveni ĝuste al esperantistoj ĉar ili povos inviti la teatron je tre konvenaj kondiĉoj kaj tiel povos per luda kaj nekonvencia maniero plu diskuti la temon. Krome la teatraĵoTHREE estas profesie tone kaj bilde komplete dokumentita.

5. *Ĉu kontaktis vin homoj kiuj interesiĝis pri Esperanto kaj kiuj opiniis ke via ideo pri neceso enkonduki Eŭropan lingvon baze de Esperanto estas bona?*

Esperanto ekestis en 19-a jarcento je filantropie idealisma fono kaj pro tio ricevis sian apartan forton. Nova estas la koncepto apliki la lingvon por ekonomiaj celoj, kio estas kontraŭdira: unuflanke la efikpotencialo ne estas unusence klara kaj pro tio misgvida kaj aliflanke venas la homa kaj filantropa dimensio tra la potenciala ekonomia apliko de Esperanto, kiu ĝis nun estis ties motoro, en malantaŭon. Tiuj du polusoj portas en si abundan diskutmaterialon kaj estas esence la enhava centro de THREE, ili devigas la kulpensantan rigardanton al klara pozici-alprenado. Pro tiu fono la demandoj kaj temoj de THREE (Esperanto: socia kaj ekonomia utopio) devas esti klare taksita kiel bona kaj grava, ĉar ili estas prilaboritaj per luda, inteligenta kaj multtavola maniero. Sekve ni havis plurajn reagojn kaj rektajn interparolajn interŝanĝojn kun esperanto-rondoj el diversaj landoj (Ĉinio, Brazilo, Belgio, Ĉeĥio, Germanio) kaj ankaŭ kun la homoj de E-D-E (partio Eŭropo-Demokratio-Esperanto).



6. *Kiaj estas viaj planoj por la estonto?*

Momente ni ne definitive fiksis pliajn prezentaĵojn. Ni planas en 2012 turnei en Germanio kunlabore kun Lars Sözüer (Esperanto-kulturaktivisto en Germanio), krome ni ludos en La

Chaux de Fonds en Svisio, kie troviĝas plua grava Esperanto-centro samkiel ni intencas prezenti en Belgio (Bruselo).

7. *Kie ni povas vidi iom da bilda dokumentaro?*

Fotoj estas videblaj je <http://three.umsnjip.ch/photos.html>

Kaj videoj je <http://three.umsnjip.ch/audiovideo.html>

8. *Mallonge prezentu vin ĝenerale!*

UMS 'n JIP apartenas al la plej nekutimaj svisaj ensembloj pri nova muziko de la nuntempo kaj pro siaj pli ol 70 koncertoj jare kaj pli ol 10 teatraj laborejoj jare al la plej aktivaj ensembloj de sia speco en la mondo. Per voĉo, blokfluto kaj elektroniko ĝi esploras kaj agas konsekvence, virtuoze kaj seksloge je la kunmiksiĝo de muzika avangardo kaj populara muziko, je la kruciĝo de analogia kaj diĝita performanca prezentado, je kruciĝo de koncertaĵoj kaj muzikteatro kaj estis gaste per pli ol 200 fojoj prezentaj en la plej gravaj festivaloj de nova muziko en Eŭropo, Usono, Rusio kaj Ĉinio. En 2011 ĝi ricevis krom diversajn premiojn por komponado la prestiĝan svisan stipendion MusiquePRO de 90.000 svisaj frankoj de la kantono Wallis. Muzike transprenis ĝian gvidadon Irvine Arditti (Arditti Quartet London), unu el la plej signifaj interpretoj de la moderna muziko.

Javier Hagen

MONTKABANA RENKONTIĜO 2011 EN SLOVENIO

De la 29.09 - 02.10.2011 en Slovenio en Valvazorjev dom sub la pinto Stol okazis Montkabana Renkontiĝo (tute apud la aŭstra landlimo en la regiono de montaro Karavanke. Partoprenis trideko da partoprenantoj el 6 landoj (Kroatio, Slovenio, Slovakio, Ĉeĥio, Hungario kaj Nederlando).



La montarana domo kie oni restadis troviĝas je alteco de 1200 metroj kaj la pinto Stol kiu estis la celo de la ĉefa ekskurso je 2200 m. Dum la tre bela kaj preskaŭ somera vetero okazis ĉiutage interesaj ekskursoj kiuj daŭris inter tri kaj 8 horoj. Partoprenis kaj spertaj montgrimantoj kaj infanoj. La aranĝo okazas ĉiujare en fino de septembro kaj tiu ĉi estis jam la 22-a MKR. Komencaj 10 MKRoj estis organizitaj de Aŭstra Esperanto-Junularo kaj la postaj de Kroatia Esperanto Junulara Asocio (<http://www.keja.hr/mkr-n.html>).



Zlatko Tišljar

KURSOJ EN BOURESSE

En oktobro en Bouresse okazis altnivelaj kursoj:



19-a – 24-a de oktobro: **Pri originala esperanto-literaturo** en la kulturcentro Kvinpetalo en Bouresse, Francio. Ĝin gvidis Anne Jausions. Kunlaboremo, bona etoso, altnivelaj diskutoj, jen karakterizoj de la koncerna kurso. Granda pluso al la staĝo estis la ebleco konsulti la riĉan bibliotekon de la centro. Partoprenis pluraj eksterlandanoj (eĉ el Finnlando venis partoprenantino). Ĉiuj staĝanoj valore kontribuis al la kurso. Ĵurnalisti venis por raporti pri la aranĝo.

Du paralelaj staĝoj:

25-a – 29-a de oktobro: Michel Dechy, pri "**Praktikado de la lingvo per Tinĉjo-bildstrioj**" Uzante regule ekde kvin jaroj la albumon "Tinĉjo en Tibeto" en siaj Esperanto-kursoj (2a nivelo), Michel kunigis tiun laboron en libra formo : « La bildstrioj kiel lernolibroj », aperinta en 2010. Michel montris kiel utiligi tiun libron, ilustritan per bildoj el la verko de Hergé, plivalorigita per fotoj kaj situacioj ebligantaj trakti temojn kiel sporto, amaskomunikiloj aŭ niaj naciaj kaj regionaj festoj, por logi al Esperanto diversspecan publikon.

25a-29a de oktobro: Bernard Lagrange, pri "**Neperforta komunikado**"

Neperforta komunikado celas helpi homojn interrilati tiel, ke la komunikofluro inter ili pliboniĝu. Ĝi utilas kaj en ĉiutaga komunikado kaj por solvi pace konfliktojn en persona, profesia aŭ politika medioj. Ĝi ne estu tekniko por agigi aliulon laŭ iu maniero, sed baza sinteno, en kies malfono staras pozitiva taksado de sociaj rilatoj. Dum la staĝo oni ekpraktikis tiun ĉi komunikadon per diversaj praktikaj ekzercoj.

Claude Nourmont

ANKAŬ FACEBOOK UZAS ESPERANTON

En septembro fondiĝis kadre de **Facebook** la grupo " **Amikaro de la Eŭropa Esperanto-Unio** ". La celo de la nova Facebook-grupo estas de jaro al jaro ampleksigi la informadon pri la aktiveco de EEU ne nur en Eŭropo, sed tutmonde.

Membroj de Facebook estas petataj skribi la vortojn **Amikaro de la Eŭropa Esperanto-Unio** en la serĉilon de Facebook, poste aliĝi kaj fine inviti siajn Facebook-geamikojn en tiun ĉi grupon. Espereble ĝis la fino de tiu ĉi jaro ni havos jam pli ol 200 membrojn, kaj post unu jaro jam pli ol 1000 membrojn, en la tuta mondo. Komprenoble, se ankaŭ Vi helpas kaj kunlaboros.

Kaj Facebook, kaj Ipernity uzas Esperanton.

Oni devas nur - en la plej malsupra linio de la komencaj paĝoj - **serĉi Esperanton inter la elekteblaj lingvoj**. Eĉ guto malgranda, konstante frapante traboros la monton granitan...

Ludoviko Molnar

POLAJ POLITIKISTOJ KAJ ESPERANTO

En Pollando ĝis hodiaŭ estas sume 16 senatanoj en Senato kaj parlamentanoj en Sejmo favoraj por esperanto, kaj okaze alvoko al ĉiuj polaj esperantistoj kiuj ne estas kontraŭ la personaj kontaktoj kun politikistoj, speciale kun parlamentanoj kaj senatanoj por konvinki ilin al Esperanto - same kiel agas la anoj de la Pola Societo EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto) - legu sube.

POLA SEJMO (parlamento)

1. Tadeusz Tomaszewski - parlamentano favora por Esperanto eniris Polan Sejmon (parlamenton), li dum la 2a GES (Grandpolia Esperanta Somero) en Wağrowiec promesis



fondi en la nova, do la nuna parlamento kaj registri ĉe Prezidanto de Pola Sejmo la oficialan Parlamentanan Grupon de E-amikoj (sed atento: estas bezonata minimume 15 persona grupo - do ni strebu por trovi ankoraŭ minimume 5 parlamentanojn en Sejmo favorajn por Esperanto kaj pretaj por esti anoj de la Parlamenta Grupo de E-amikoj) kaj komprenoble Tadeusz Tomaszewski pretas gvidi la grupon kaj regule, ekz. ĉiu-kvaronjare kontaktiĝi kun EDE-PL en la sidejo de Pola Sejmo, do havi la konstantajn kontaktojn.

Kaj krome 4 aliaj parlamentanoj favoraj por Esperanto (de Alianco de Demokratia Maldekstrularo) same eniris Polan Sejmon:



2. Lybacka Krystyna Maria - por Esperanta interpelacio en Pola Sejmo kaj renkontiĝo kun EDE-anoj Witucki, Krzyżak kaj Kozyra en sia parlamenta oficejo en Poznano, krome tre aktiva por prepari la faman rezolucion de Pola Sejmo favoran por Esperanto en la jaro 2008.

3. Wenderlich Jerzy Jan - Alta Protektanto de 2a GES en Wągrowiec kaj krome korespondis pri Esperanto kun Kazimiro Krzyżak antaŭ kaj prepare por la fama rezolucio de Pola Sejmo favora por Esperanto en la jaro 2008.

4. Iwiński Tadeusz - korespondis pri Esperanto kun Kazimiro Krzyżak antaŭ kaj prepare por la fama rezolucio de Pola Sejmo favora por Esperanto en la jaro 2008.

5. Aleksandrak Leszek Grzegorz - gvidis kiel ĉiĉerono la E-delegacion tra sidejo de Pola Sejmo kaj kunorganizis ĝian renkontiĝon kun Vic-Prezidanto de Pola Sejmo Jerzy Szmajdziński.

„SLD (Sojusz Lewicy Demokratycznej) Alianco de Demokratia Maldekstrularo (AddM) Democratic Left Alliance *polit.* Sojusz Lewicy Demokratycznej (SLD)”

Same de Civitana Platformo eniris Polan Sejmon jenaj parlamentanoj favoraj por Esperanto:

6. Biernacki Marek - oficiale partoprenis plantadon de vito kaj inaŭguron de E-memorŝtono "Slovenio" en Malborko, kaj kelkfoje renkontiĝis kun EDE-anoj Krzyżak kaj Kozyra en lia parlamenta oficejo en Gdynia por diskuti pri la E-temo.

7. Orłowski Paweł - danke al la persona renkontiĝo kun EDE-anoj Kazimiro Krzyżak kaj Eduardo Kozyra en lia parlamenta oficejo en Malborko, li aktive helpis EDE-PL en la akiro de la Ŝtata Ordeno por Etsuo Miyoshi pro la E-agado, atribuita de Prezidento de Pollando Bronisław Komorowski.

8. Nowak Sławomir - nun pere de li EDE-PL provas aranĝi en Prezidenta Palaco en Varsovio la renkontiĝon de Etsuo Miyoshi kun Prezidento de Pollando Bronisław Komorowski decembre 2011.

„PO (Platforma Obywatelska) Civitana Platformo Civic Platform *polit.* Platforma Obywatelska (PO)”

Same de Juro kaj Justeco eniris Polan Sejmon jenaj parlamentanoj favoraj por Esperanto:

9. Sellin Jarosław - en sia parlamenta oficejo en Gdynia renkontiĝis kun Krzyżak, Kozyra kaj kun alta oficisto en Eŭropa Parlamento s-ano Michael Cwik, el Bruselo.

„PiS (Prawo i Sprawiedliwość) Juro kaj Justeco Law and Justice *polit.* Prawo i Sprawiedliwość (PIS)”

Same de Movado de Palikot eniris Polan Sejmon parlamentano favora por Esperanto:

10. Kotliński Roman - en sia redakcio kiel ĉefredaktoro akceptis EDE-anojn Krzyżak, Francisko Witucki kaj Kozyra kaj en sia gazeto kelkfoje publikigis artikolojn de Kazimiro Krzyżak pri Esperanto.

„RP (Ruch Palikota, Ruch PL) Movado de Palikot Palikot's Movement *polit.* Ruch Palikota, Ruch PL (RP)”

SENATO

Jen senatanoj favoraj por Esperanto:



1. Borusewicz Bogdan (PO - Civitana Platformo) - la Prezidanto de Pola Senato – li estis la Alta Protektanto de Ago-Semajno '07 en Malborko kaj Alta Protektanto de Oficiala Post-kongreso de UEA '09 en Malborko.

2. prof. d-ro Wittbrodt Edmund (PO - Civitana Platformo) - post la korespondado pri Esperanto kun EDE-ano Kazimiro Krzyżak la senatano invitis EDE-anojn Krzyżak kaj Kozyra. Dum la renkontiĝo (julio 2011) li donis tre interesan proponon, ke ni organizu E-kurson por senatanoj komence de 2012 jaro kaj ke siaflanke li persone konvinkos kelkajn senatanojn por la kurso (ni same strebas kaj strebos tiudirekte). Lige kun tio ni proponis al Arek Zychewicz, ke ĝuste li gvidu la E-kurson por senatanoj, kompreneble se sukcesos al prof. Wittbrodt kaj kompreneble ankaŭ al ni trovi interesitojn inter la novelektitaj senatanoj. (Ni aldonu, ke prof. Wittbrodt estis: en Senato en la jaroj 2005-2011 Prezidanto de la Komisiono pri Eŭropa Unio; 2000-2001 Ministro pri Edukado; 1990-1996 Rektoro de la Gdanska Politekniko).
3. Zaborowski Roman (PO - Civitana Platformo) - ĝis fino de 2011 Pomeria Vojevodo kaj ĝuste kiel vojevodo apogis niajn strebojn en la akiro de la Ŝtata Ordeno por s-ano Etsuo Miyoshi pro la E-agado de atribuita de Prezidanto de Pollando Bronisław Komorowski - ĝuste en tiu afero li persone akceptis la 4an de majo 2011 EDE-anojn Krzyżak kaj Kozyra en sia oficejo. (Ni aldonu ke: en la formularo de la Kapitulo de la Ordeno estis necesa opinio de la loka vojevodo kaj ĝuste plenumis ĝin bonege Roman Zaborowski, krome li estis kuninaŭgurinto en Parko de la Mondo en Malborko de la E-memorŝtono "KAŜUBIO").
4. Czarnobaj Leszek (PO - Civitana Platformo) - Kiel la ĝisnuna Vic-Prezidanto de la Pomeria Sejmeto lin renkontiĝis kun Eduardo Kozyra kiu tiam estis kunorganizanto de Ago-Semajno '07 en Malborko kaj rezulte Pomeria Sejmeto finance helpis la menciitan E-aranĝon.
5. Jackowski Jan Maria (PiS - Juro kaj Justeco) - Eks-Prezidanto de la Komisiono pri Kulturo en Pola Sejmo, li estas frato de konata esperantistino el Szczecin d-rino Jackowska Maria Teresa, kelkfoje persone kontaktiĝis kun Eduardo Kozyra i.a. pri Esperanto kiam ili kune en la sama listo en Pomerio kandidatis en la jaro 2005 en la balotoj al Pola Sejmo de la listo de Ligo de Polaj Familioj.
6. Cimoszewicz Włodzimierz - Eks-Ĉefministro de Pola Registaro kaj Ministro de Eksteraj Aferoj; krome la Honorkomitato de la UK en Bjalistoko '09 kaj persone partoprenis la inaŭguron de la kongreso.

Eduardo Kozyra

INTERLINGVISTIKAJ SESIO KAJ SIMPOZIO EN UNIVERSITATO ADAM MICKIEWICZ, POZNANO, POLLANDO

Vi povas legi pri la sukcesaj poznanaj eventoj (<http://edukado.net/novajhoj?id=173>):



- nova, jam 5-a interlingvistika grupo en UAM (sesio 17-21.09);
- 2-a Interlingvistika Simpozio "Interlingvistiko kaj esperantologio antaŭ la defioj de la 21-a jarcento" (22-23.09);
- novaj diplomitoj de la 3-jaraj Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj de la Instruista trejnado de la Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj ILEI.

Vi povas aŭskulti intervjuojn pri la poznanaj

eventoj en la Pola Retradio (<http://retradio.posterous.com/>):

- 26.09.2011: partoprenantoj (ekde la 10a min.)

- 30.09.2011: Ilona Koutny (ekde la 5a min.) - interalie ankaŭ pri universitata premio pro interlingvistika agado

Bonvolu disanonci la novaĵojn en viaj medioj!

Ilona Koutny

HISPANAJ ESPERANTISTOJ MANIFESTACIIS

La 14-an de oktobro partoprenis ankaŭ esperantistoj en Madrida manifestacio kadre de la tutmonda agado por reala demokratio. Jen fotoj pri ĝi:

<http://www.ipernity.com/doc/pedroesperanto/album/252677>

Pedro Hernandez

8-A INTERNACIA KONKURSO PRI POEZIO "KASTELO DE DUINO 2012"

Limdato: 7a de januaro 2012

Ĝeneralaj reguloj:

- Dediĉita al junularo ĝis 30 jaroj
- Senpaga partopreno
- Temo ĉijara: SPEGULO/maskoj



Oni povas partopreni en unu aŭ pliaj el la sekvantaj branĉoj

1. BRANĈO: POEZIAĴO NEELDONITA

Oni partoprenas per unu poeziaĵo neeldonita kaj neniam premiita (maksimume 50 versoj). Internacia ĵurio, en kiu membrigas poetoj kaj recenzistoj spertaj en multaj lingvoj, taksos la poeziaĵojn laŭeble en la originala lingvo, sen detaloj pri la aŭtoroj garantianta tiamaniere senpartiecan juĝon.

La poeziaĵoj estas taksataj do ankaŭ en la originala lingvo de la konkursantoj, kondiĉe tamen ke oni havigu tradukon ĉu itale, ĉu angle, ĉu france, ĉu esperante.

Por la itallingvaj poeziaĵoj, la traduko en alian lingvon ne estas deviga, sed ja bonvena.

La poeziaĵo devas atingi la ĵurion ĝis la 7a de januaro 2012 per:

- **elektronika poŝto** al la adreso valeragruber@alice.it
La mesaĝo devas enteni la aliĝilon komplete plenigitan (vidu sube), kaj la poeziaĵon oni sendu per "word" aŭ "rtf" (ne akceptataj aliaj formatoj) kiel aldonitaĵon.
- **ordinara poŝto al:** Gabriella Valera Gruber, Via Matteotti 21, 34138 Trieste, Italio.
La letero devas enteni la aliĝilon komplete plenigitan kaj subskribitan. Pri sendodato atestos la poŝta stampo, sed neniu verko estos akceptita post la eklaboro de la ĵurio.

Premioj:

- Unua, dua kaj tria premioj: ĉiu egala al € 500
- Medalo de la Prezidento de la Itala Respubliko

La konkurso estas parto de la agado de Asocio »Poesia e Solidarietà« (Poezio kaj Solidareco) kaj estas kunligita al solidarecaj programoj. La premioj devas asigni parton de la premio (€ 200) al elektota projekto pri solidara helpo prefere lokita en la deven-lando.

La poeziaĵoj de la premiitoj kaj tiuj taksitaj plej bonaj de la ĵurio, estos eldonitaj itale kaj angle ĉe IBISKOS Eldonejo Risolo – Empoli, Italio, sponsoro de la konkurso, kaj estos surbendigitaj en la originala lingvo en KD. Gajno sekve de la librovendado iros favore al Fondaĵo Luchetta-Ota-D'Angelo-Hrovatin por la infanaj viktimoj de milito (www.fondazioneLuchetta.org).

- Speciala mencio por eldoneblo kaj pokaloj por la plej meritaj verkoj
- Aliaj specialaj mencioj kaj malpli gravaj premioj estos destinitaj al la plej indaj poeziaĵoj de malpli 16-jaraĝuloj.

1. BRANĈO: TEATRAĴO (Monologo aŭ dialogo inter du roluloj)

Oni partoprenas per teatra teksto, maksimume 5 folioj por entute 10.000 literspacoj po maksimume 2.000 literspacoj ĉiufolie: tekstoj pli longaj ne estos akceptitaj. Teatraĵo, originale verkita en alia lingvo, devas esti tradukita en tre bonan italan lingvon. Oni taksos la verkon laŭ la itala traduko, ĉar ne eblas tion fari en la originalo. La verko devas atingi la ĵurion ĝis la 7-a de januaro 2012 per:

- **elektronika poŝto** al la adreso valeragruber@alice.it
La mesaĝo devas enteni la aliĝilon kaj la « deklarojn » (vidu sube), kaj la teatraĵon oni sendu per "word" aŭ "rtf" (ne akceptitaj aliaj formatoj) kiel aldonitaĵon.
- **per ordinara poŝto al** Gabriella Valera Gruber, Via Matteotti 21, 34138 Trieste, Italio
La letero devas enteni la aliĝilon komplete plenigitan. Pri sendodato atestos la poŝta stampo, sed neniu verko estos akceptita post la eklaboro de la ĵurio.

La ĵurio taksos la verkojn sen detaloj pri la aŭtoroj, garantiante tiamaniere senpartiecan juĝon.

Premioj:

- Unua, dua kaj tria premioj: pokalo aŭ ŝildo
- Honormencio
- La verkoj premiitaj kaj tiuj selektitaj kun honormencio estos legataj en grava urba teatro okaze de la premia ceremonio de la konkurso

Edvige Ackerman

venu kune festi kaj amikumi

En la Esperanto-kastelo Greziljono dum la jarfina semajnfino (de la 27-a de decembro ĝis la 2-a de januaro 2012) okazos aranĝo. Venu kun via tuta familio aŭ viaj plej bonaj geamikoj, ili bezonas koni nur 1 Esperanto-vorton: "fantomo". Por gaje dancadi kun la kastelaj fantomoj, masko-vestu vin kiel ili: diamanto-brile aŭ dento-timige. Prelegu pri sorĉitaj anglaj kasteloj aŭ animu alian temon.

Loko: Esperanto-kastelo Greziljono. urbo Baugé, 275 km sudokcidente de Parizo.
Ni peras kunveturadon.

Informoj: <http://gresillon.org/jarfino>

Aliĝilo: <http://gresillon.org/spip.php?rubrique27>

Jannik Huet

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 31-an de oktobro 2011

Redaktoro: Zlatko Tišljär

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljär, Sean O Riain, Renato Corsetti, Claude Nourmont, Marian Vochin, Gianni Conti, Javier Hagen, Ludoviko Molnar, Janick Huet, Ilona Koutny, Edvige Ackerman

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

